der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

14. Jahrgang Nr. 92 (6/1978) 30 Pf

25 jaroj Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

La fondiĝo de MEM en la jaro 1953 respondis al la kreskanta konscio, ke esperantistoj devas pli aktiviĝi en la pacbatalo. Tio estis grava ekkono, ĉar furiozis la „malvarma milito“ kaj la paco estis daŭre minacata. Hodiaŭ, retrorigardante 25-jaran historion de MEM ni ne povas ne omaĝi al ĝia iniciatulo, la hispano Anton Balague loĝinta post la Franka milito en Aŭstrio.

La bilanco estas impona. MEM ĉiam staris sur la flanko de la pacfortoj, per siaj rimedoj agadis kontraŭ imperiisma milito. por paco kaj solidareco.

En sia organo „Paco“, kiu ĝis hodiaŭ aperis en pli ol 200 numeroj, kaj kies redaktadon partoprenis ne malpli ol 20 landoj (kp. „Pacaktivulo“ 101, p. 5) MEM levis sian voĉon kaj traktis gravajn internaciajn temojn. En „Pacaktivulo“, organo de la funkciuloj kaj aktivuloj de MEM, de kiu ankaŭ jam ekzistas pli ol 110 numeroj, oni ofte trovis protestrezoluciojn kontraŭ imperiismaj agoj minacantaj pacon.

La membroj de la Internacia Komitato de MEM kaj ties sekretariaro organizis MEM-kunvenojn dum Universalaj Esperanto-kongresoj, preparis la ĝeneralajn konferencojn (ok entute ĝis 1978), kunlaboris en neesperantistaj porpacaj medioj kaj organizoj kaj entreprenis plej diversajn aliajn iniciatojn. De speciala graveco estas la daŭre plifortiĝanta ligo al Monda Packonsilantaro, kies prezidanto Romesh Chandra alte aprezas la agadon de MEM (kp. la intervjuojn en „der esperantist“, n-ro 83, p. 3, n-ro 86, p. 12—13).

Nuntempe la batalo inter la fortoj de la milito kaj tiuj de la paco konsiderinde pliakriĝis. MEM tion konscias kaj alprenis la necesajn decidojn dum sia VIIIa Ĝenerala Konferenco (kp. „de“ 5/78, p. 10—12). Tamen ŝajne necesas, elstarigi kelkajn pliajn gravajn taskojn:

- Necesas pli profunde trapensi la aktualan staton kaj agadmanieron de MEM, ĝian strategion kaj taktikon. Ekzistas sufiĉe da kaŭzoj por ne kontenti ekzemple kun la paso de diversaj MEM-aranĝoj.
- Antaŭ ĉio MEM devas tre baldaŭ respondi al la oferto farita de Romesh Chandra en sia lasta intervjuo: „Kaj mi persone esperas, ke ni tre

200 esperantistoj en Rostock

La IIIa Centra Renkontiĝo de la Esperantistoj en Kulturligo de GDR okazis de la 13a ĝis 15a de oktobro 1978 en Rostock. Ĝi fariĝis tre sukcesa kaj verŝajne apartenas al la plej bone organizitaj.

Antaŭ la Renkontiĝo, kiu estas komparebla kun landa esperantista kongreso, okazis du gazetaraj konferencoj (Berlin kaj Rostock), internacia varba vespero por neesperantistoj, renkontiĝo de la eksterlandaj gastoj el Bulgario, ĈSSR, Hungario, Pollando kaj USSR kun la Distrikta Estraro de Kulturligo. Kiel kutime okazis renkontiĝa vespero, debatoj en plenkunsidoj, krome esperantlingvaj prelegoj de eksterlandaj referentoj kaj laboris fakgrupoj. Dum kulturvespero ĉeĥa artistino Eva Seemanová prezentis la monodramon „La ekskurso de la mortintaj knabinoj" de Anna Seghers. Ne mankis ekskurso al la Balta Maro kaj veturo en la haveno de Rostock. La 180 partoprenintoj el GDR (140 delegitoj kaj 40 gastoj) akceptis deklaron, kiun ni en n-ro 6/78 publikigos en la germana originalo. La gazetaro tutrespublika kaj distrikta abunde raportis, la regiona radiostacio elsendis intervjuon.

Ampleksan raporton kun fotoj ni prezentos en „der esperantist" 1/1979.

★

baldaŭ havos eblecon por plia duflanka renkontiĝo kun la gvidantaro de MEM, por pritrakti komune la ambaŭflankan laboron, laboron por kiu mi deziras ĉion bonan" (kp. „de" n-ro 86, p. 13).

— Krome mankas ĉiujara regula alloga MEM-aranĝo (seminario, renkontiĝo k. t. p.), dum kiu oni ne nur aŭskultos interesajn prelegojn kaj partoprenos seminariajn debatojn pri la aktualaj tre komplikaj internaciaj problemoj, sed kie ankaŭ la MEM-aktivuloj trovus la necesan tempon kaj trankvilon por profunde diskuti pri sia MEM-agado.

En sekvontaj kajeroj de „der esperantist" ni represos la ĉapitrojn el la broŝuro „Koncize pri MEM 1953/1978" redaktita de Oldřich Knichal kaj eldonita de la ĉeĥoslovaka MEM-sekcio. Krome ni atentigas pri la koncernaj MEM-ĉapitroj en la libro „Esperanto: lingvo, movado, instruado" (p. 111–127).

D. Blanke

★

Leipzig atendas vin!

Leipzig, dueplejgranda urbo de GDR, urbo de internaciaj foiroj, kongresoj kaj renkontiĝoj estas ankaŭ urbo kun tradicia kaj vigla Esperantista vivo. De la 9a ĝis la 11a de marto en 1979 la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo „IFER" '79 kunigos 120 diversnaciajn geesperantistojn. Sub la ĝenerala temo „Jen kiel ni kreskis" ni aranĝos por vi atrakcian programon, en kiu ankaŭ interkona vespero, libro-bazaro, urborigardo, dancado ne malestos.

Ne maltrafu vian ŝancon, sed senprokraste petu programon kaj aliĝilon ĉe: Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de IFER, DDR - 701 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115.

La nova prezidanto de MEM

D-ro Imre Pethes, juristo kaj organizanto, estas la nova prezidanto de MEM. Li laboras kiel fervojista direktoro kaj estas vicfakestro ĉe la Fervojista Ĉef-direkcio de Hungario (MÁV).

Sian Esperanto-agadon d-ro Pethes komencis en fervojista esperantista grupo de Budapest. 1967 li kunpreparis kiel sekretario la Fervojistan Esperantistan Kongreson 1967 en Budapest kaj partoprenis diversajn internaciajn fervojistajn Esperanto-Kongresojn. La nova MEM-prezidanto, vicprezidanto de Hungara Esperanto-Asocio kaj de la Hungara IFEF-Sekcio, ankaŭ aparte aktiviĝis en la porpaca agado, organizante i. a. diversajn MEM-kunvenojn. Pro lia porpaca agado d-ro Pethes ricevis kelkajn distingojn.

Esperanto-gazetoj raportis, ke la Usona prezidento Jimmy Carter simpatias kun la celoj de la Esperanto-movado ...

Al amiko de Esperanto, s-ro Jimmy Carter !

Via **Neŭtrona Bombo**

certe estas la kulmino de via humanisma strebado: Ĝi solvos la lingvoproblemojn radikale kaj eĉ ne tuŝos la 'Fundamenton de Esperanto'!

La neútrona bombo solvos nian problemon?!

Jen, grafikaĵo, kiun ni ĉerpis el la multflanka „Leipziga Informilo", lerte redaktita de Jürgen Hamann.

Violin Oljanov

ĈU SAMAJ METODOJ POR ĈIUJ?

Kun intereso mi legis la artikolon de d-ro Vilho Setälä en „der esperantist“ 83 (3/77). Fakte ĝi estas bazita sur respondo al miaj metodikaj notoj publikitaj en antaŭaj kajeroj de la sama gazeto. La aŭtoro asertas (tute prave!), ke „grandparte ili estas adaptitaj al la bezonoj de la lernantoj, kies gepatra lingvo estas iu el la hindo-eŭropa familio“. Kompreneble! Mia difino estus eĉ pli kategoria: miaj notoj estas direktitaj precipe al bulgaraj E-instruistoj, kaj pro tio ili estis publikitaj en „Bulgara Esperantisto“, de kie estas represitaj en „de“. Mi estis surprizita, kiam mi vidis ilin en la organo de la germanaj esperantistoj. Mi plurloke turniĝas al nome bulgaraj esperantistoj kaj parolas pri bulgaraj kondiĉoj (iuj el tiuj lokoj estas lasitaj en „de“, ekzemple sur paĝo 9 de n-r-o 76). Sed verŝajne la germanaj amikoj trovis lokojn, kiuj tutplene validas ankaŭ por ili kaj verŝajne. kiel asertas ankaŭ Setälä, por la tuta hindo-eŭropa familio, t. e. preskaŭ por la tuta eŭropa kontinento kaj konsideris utila ilin represi. Mi aldonus, iuj el miaj notoj validas por ĉiu ajn nacio.

El la ĉi-supra diritaĵo sekvas, ke unu sama „fiksita“ metodo ne povas validi por ĉiuj okazoj, des pli — por ĉiuj nacioj. Mi ĉeestis en Pollando seminarion de kursanoj en koresponda kurso. Unu el la bazaj diskutataj demandoj estas la uzo de la difina artikolo. Estis klare, ke tiu punkto de la gramatiko estas malfacile komprenata de la lernantoj. Nature, ĉar en pola lingvo ĝi mankas. Kontraŭe, por bulgaroj ĝi ne estas problemo, kvankam ili uzas ĝin pli ofte ol la logiko postulas tion. Tamen por la bulgaroj malfacilan lokon prezentas la akuzativo, kio ne validas por la rusoj kaj la germanoj. Jen la diferenco. La Esperanto-lektoro instruanta al bulgaroj, devas koncentri sian atenton al la instruo de la akuzativo, al la poloj — de la artikolo, al la anglo — eble de la prononco, al la rusoj — de la uzo de la verbo „estas“ ktp.

Laŭ tradicio kaj imito de eksterlandaj E-instruistoj kaj lernolibroj bulgaraj instruistoj instruas unue la akuzativon de la substantivo, poste de la adjektivo kaj fine de la persona pronomo. Tiu procedo eble estas taŭga por germanoj, poloj, rusoj k. a. La bulgaroj tamen malfacile perceptas tiun akuzativon. Natura por ili estas yojo komenci per akuzativo de la persona pronomo, ĉar ĝi restis nura en la bulgara lingvo, kaj la lernantoj ĝin perceptas kiel ion naturan. Poste la anstataŭigo de la personalo per substantivo estas jam pli facile komprenebla per la konvinko de la logiko. Tion mi eksplicite klarigas en la ĉi-supre menciitaj notoj emfazante tiumaniere la dependon de la metodo de la aŭskultantaro, de ties lingva, kultura nivelo, aĝo . . . kaj ne lastloke — nacieco. (Bedaŭrinde ĝuste tiu ĉi ĉapitro — pri la instruado de la akuzativo — aperis en „de“ fuŝe, pro defalo de iuj teksteroj perdiĝis la logika ligo inter la frazoj kaj rezultis sensencaĵon.)

El ĉio-ĉi sekvas, ke la ekzemploj de konataj por la bulgaroj vortoj (studento, generalo, vino, romano . . .) devas esti anstataŭigataj laŭ la postuloj de la nacia lingvo de la kursanoj. Memkompreneble, se ne ekzistas tiaj vortoj (egalaj en Esperanto kaj la koncerna nacia lingvo), ni ne uzos tiun metodon.

Tamen kion signifas la propono de d-ro Setälä: „La regulon (pri komenco per konataj vortoj — mia noto) ni devas tute renversi: komenci per la plej ĉiutage bezonaj vortoj. Se ni absolutigus tion (kiel kategorie estas dirite en la nomita artikolo), ĝi transformiĝus en absurdaĵon. Evidente tiu propono validas ankaŭ nur por iuj nacioj. La plej feliĉa okazo estas, se

Bernard Golden

PRA-ESPERANTISTO EN BERLINO

En 1881 alvenis en Berlino 19-jara eks-bjalistokano celanta fariĝi la inĝeniero en la Politeknika Instituto ĉe Schinkelplatz. La jaron antaŭ sia vojaĝo al Germanio li pasigis en la medicina fakultato de la Universitato de Varsovio. Tie li enkapigis unu gravan fakton: li ne taŭgas por la kuracista profesio.

Estante poligloto — li posedis tiom da lingvoj, kiom lia samurbano d-ro Zamenhof, kaj ankoraŭ pli —, li profitis la okazon plivastigi sian multlingvecon, dum li laboris super sia desegno-tablo en la Instituto; dekstre estis serbo, maldekstre, greko.

Tiu junulo estis Leo Wiener, kiu kiel universitata studento en Varsovio aliĝis al rondo de polaj patriotoj. Trovinte la flamiĝemon de la tiutempaj poloj same nekontentiga kiel la apation de siaj rusaj konatoj, Wiener forlasis ilin, sed falis de sitelo en barelon. kiam, laŭ siaj propraj vortoj, li „drivis en germanan filistrismon, kun ĝia apudmeto de scienco kaj biero". Baldaŭ evidentiĝis al Wiener, ke lia inĝeniera kariero estis destinita daŭri same mallonge kiel lia kuracista studado.

Unu nokton, dum li trinketis alkoholaĵon kaj legis gazetojn en kafejo Bauer, li ekvidis artikolon pri la ekonomiaj avantaĝoj de la vegetarismo. Wiener decidis esplori la aferon. La sorto kondukis lin al Taubenstrato, kie situis vegetara restoracio, kaj tie li komencis novan stadion de sia vivo. Li fariĝis zelota membro de la Akademia Vegetarana Societo, kiu kunvenis en tiu restoracio, kaj faris planon fondi vegetaranan komunumon en la tropikoj. Li elektis Britan Hondurason (Belizon) ĉar por tiu celo la brita registaro donacis terpecojn. Studento de porinstruista altlernejo konsentis akompani Wiener al Mezameriko, do la du ekveturis de Hamburgo en februaro 1882.

---

ni povus kunigi la du principojn, t. e. komenci per ĉiutage bezonaj vortoj, kiuj estas konataj laŭ formo kaj elparolo al la kursanoj. Kompreneble tio estas la ideala kazo.

Sed kion signifas „ĉiutage bezonaj vortoj". Ĉu ili estas ĉiam la samaj? Certe ne! Ankaŭ tie ĉi influas la naciaj moroj, kutimoj, kulturo. Se la vorto „saŭno" estus utila por la finnlanda instruisto, por la bulgara ĝi estas tute netaŭga, ĉar estas nekonata ne nur la vorto, sed ankaŭ la objekto. Certe ne samaj estas la „ĉiutage bezonaj vortoj" pri la kuirado, pri la aranĝo de la ĉambroj, pri la aĉetado, promeno sur la strato, eĉ pri lernejo. Eĉ en unu sama nacio ne en ĉiuj lokoj de la lando la „ĉiutage bezonaj vortoj" estas la samaj. Tio precipe validas pri la lingvaĵo de la urbanoj kaj la vilaĝanoj.

Konkludo. Absolutigo de reguloj ofte estas danĝera en la pedagogia kaj speciale metodika kampo. La principojn la bona Esperanto-pedagogo devas apliki rekree. La precizigita metodo de instruado de diversaj partoj de la lingvo adaptiĝas al la konkreta okazo depende de diversaj faktoroj. Plej grava el ili estas la kursanaro: instruiteco, ĝenerala kulturo, lingva kulturo, aĝo, sekso, nacieco, profesio, personaj interesoj ktp. Aliajn faktorojn prezentas la kursejo, la moroj kaj la kutimoj en al koncerna landregiono, tiaj povas esti eĉ la klimataj apartaĵoj, la naturo, la konkreta pejzaĝo, la kutimaj okupoj de la loĝantaro ktp.

La demando estas komplika kaj la plej ĝusta konkretigo de la metodo dependas de la sperteco de la instruisto.

Surmare la kolonia projekto fiaskis, kiam Wiener kaj lia partnero ne povis akordiĝi. Tamen, la vojaĝo ne estis tute vana por Wiener, kiu sukcesis aldoni la anglan kaj hispanan al sia lingva repertuaro. La eŭropa ĉapitro de la vivhistorio de Leo Wiener finiĝis, kiam lia ŝipo atingis Nov-Orleanon, Usono. Tie la 20-jarulo, kun nur kelkaj cendoj en la poŝo, elŝipiĝis kaj travivis diversajn aventurojn, vagante kaj laborante en la suda kaj meza partoj de Usono. Li revenis plurfoje poste al Eŭropo, sed tiam li estis konata filologo kaj universitata profesoro pri la slavistiko ĉe la prestiĝa Universitato Harvard en Kembriĝo, Masaŝuseco.

Kiel do Leo Wiener rilatas al Esperanto? Por tiu parto de la historio estas necese reiri en la pasintecon al la 1860-aj kaj 1870-aj jaroj. Wiener naskiĝis en Bjalistoko en 1862, tri jarojn post Ludoviko Zamenhof. Ne estas certe, ke ili konis unu la alian dum sia knabaĝo en tiu urbo. Ĉiuokaze, li amikiĝis en Varsovio ĉirkaŭ la jaro 1877, kiam ambaŭ estis gimnazianoj tie, kvankam ili ne frekventis la saman lernejon.

En 1878 la 19-jara Ludoviko jam pretigis sian unuan planlingvan projekton *Lingwe Uniwersala,* kaj li komencis instrui ĝin al kelkaj samgimnazianoj kaj kamaradoj. Antaŭ precize 100 jaroj, la 17-an de decembro (la 5-an laŭ la malnovstila julia kalendaro) okazis festo en la hejmo de la familio Zamenhof por soleni la Tagon de la Vivigo de la Universala Lingvo. Krom familianoj, ĉeestis ankaŭ ses aŭ sep lernintoj de *Lingwe Uniwersala,* inter kiuj estis Leo Wiener. La junuloj kunkantis jenan himnon, kiu estas la sola teksto en tiu pra-Esperanta dialekto restinta ĝis hodiaŭ.

Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá.

Zamenhof tradukis ĝin jene en Esperanton: Malamikeco de la nacioj / falu, falu, jam tempo estas! / La tuta homaro en familion / unuiĝi devas. La sekvan jaron la embria *Lingwe Uniwersala* movado komencis disfali, ĉar la „estontaj apostoloj de la lingvo" disiĝis. Post sia abiturientiĝo, Ludoviko Zamenhof iris al Moskvo por studi la medicinon. En 1880 Leo Wiener eniris la medicinan fakultaton de la Universitato de Varsovio, sed li ne restis tie. Kiam Zamenhof ricevis sian kuracistan diplomon en 1885, Leo Wiener estis sub-profesoro pri ĝermanaj kaj latinidaj lingvoj ĉe la Universitato de Misurio. Li ankaŭ fariĝis patro de bebo, kiu en postaj jaroj akiris renomon en la klerula mondo: Norbert Wiener, la plej elstara usona matematikisto de la 20-a jc. kaj la fondinto de la kibernetiko.

Kiel filologo Leo Wiener okupiĝis pri plej diversaj lingvoj. Krom tiuj de la slava, ĝermana kaj latinida brancoj de la hindeŭropa familio, li studis afrikajn bantuajn lingvojn, kaj indiĝenajn lingvojn de Gvatemalo kaj Jukatano. Cetere, li tradukis baladojn el la serba lingvo kaj verkis historion de la 19-jarcenta jida literaturo. Li kontribuis 8000 etimologiojn al la plej granda usona vortaro, esploris la folkloron de la ciganoj kaj tradukis en la anglan la kompletan verkaron de Lev Tolstoj, entute 24 volumojn. Nur en la sfero de internaciaj lingvoj malabundas liaj verkoj. Laŭ mia scio la solaj du artikoloj, kiujn li verkis tiuteme aperis en la berlina semajna revuo *Internationale Wochenzeitschrift für Wissenschaft, Kunst und Technik* en 1907; unu pritraktas universalajn lingvojn, la alia, Esperanton.

Ĉar en 1978 venas la centjara datreveno de la debuto de *Lingwe Uniwersala,* estas konvene rememorigi al la esperantistaro la agadon de Leo Wiener en tiu prahistoria periodo de la Esperanto-movado. Li verŝajne neniam

Junulara kongresis en Tarnovo

Gepartoprenantoj el GDR: Ingrid Erfurth, Jürgen Hamann, Renate Levin.

De la 22-a ĝis 29-a de julio ĉijare okazis la 34-a Internacia Junulara Kongreso en la iama bulgara ĉefurbo Veliko Tarnovo. La urbo Veliko Tarnovo, mezvoje inter Sofio kaj Varno, konsistas el belaj domoj kaj multaj stratoj, kiuj amfiteatre kuŝas sur la bordoj de la rivero Jantra. La domoj kvazaŭ sidas unu sur la alia.

La gejunuloj renkontiĝis en la ŝtata universitato „Kiril i Metodi". Ĉi tiu funkciis kiel kongresejo. La kongresanoj loĝis en la nova studenta domo ĉe la universitato.

La Kongreson entute partoprenis 457 gejunuloj el 27 landoj. La oficiala delegacio de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR konsistis el Jürgen Hamann, Michael Lennartz kaj Renate Levin. Krome ĉeestis pliaj 7 gejunuloj el GDR.

La solena inaŭguro okazis la 23-an de julio, kie la prezidanto de UEA, d-ro H. Tonkin, faris la festparoladon. La labora programo de la kongreso komenciĝis per la prelego de Stefan Mac Gill „TEJO: hodiaŭ"! La ĉeftemo de la Kongreso estis „Esperanto kaj interjunulara amikeco". En tiu ĉi kadro kunsidis la komitato de TEJO kaj funkciis laborgrupoj ,i. a. „Sciencteknika progreso kaj estonteco de la Internacia Lingvo", „La junularo kaj la movado por malstreĉiĝo (tiun laborgrupon sukcese gvidis Michael Lennartz), „Esperanto-artaranĝoj — formoj de interŝanĝo de kulturaj valoroj" kaj „Balkanaj popolaj dancoj — instruado kaj praktiko". Ofte la kongresanoj bedaŭrinde ne sciis, kiam kaj kie iu programero okazis. Tial nur malmultaj gejunuloj kunlaboris en laborgrupoj. La kunsido de la komitato de TEJO komenciĝis per la raporto de la estraro de TEJO pri la lasta laborperiodo. La komitato akceptis novan statuton de TEJO, kiu intertempe estas ratifikita de la komitato de UEA. Al TEJO aliĝis ĉijare la Junulara Sekcio de Ĉeĥa Esperanto Asocio, tiel ke TEJO nun havas 31 landajn sekciojn. La nova estraro, kiu elektiĝis en Veliko Tarnovo, konsistas el jenaj membroj:

---

lernis la klasikan Esperanton. Ne estas indikoj, ke li partoprenis en agadoj de la frua Esperanto-movado en Usono, eĉ en 1910, kiam lia varsovia amiko Zamenhof, venis al Vaŝingtono por ĉeesti la 6-an Universalan Kongreson. Tamen, Leo Wiener kaj la aliaj prapioniroj de Esperanto, kiuj paroletis en *Lingwe Uniwersala* tiun neforgeseblan decembran tagon, montris al Zamenhof, ke li estis sur la ĝusta vojo al la solvo de la monda lingva problemo.

Septembro 1978

Bernard Golden
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém
Hungario

Jürgen Hamann (dua de maldekstre) en konversacio kun sovetaj esperantistoj

Prezidanto:	Savas Tsiturides, Greklando
Vicprezidanto:	Czaba Lendvay, Hungario / Stefan Mac Gill, Nov–Zelando–Nederlando
Ĝenerala Sekretario:	Brunetto Casini, Italio
Sekretario:	Thomas Bormann, FR Germanio
Estraranoj:	Floreal Gabalda, Francio / Imre Szabó, Hungario / Gert van Tongerloo, Belgio / Amri Wandel, Israelo

Kiel oni povis konstati dum la kongreso, la tuta bulgara popolo flegas siajn folklorajn tradiciojn. Pro tio la kongreso havis sian altan nivelon speciale ĉe dancoj kaj kantoj. Dum la Internacia Vespero elpaŝis talentoj el la kongresanaro. La Bulgara Esperanto Teatro prezentis teatraĵon. Malfermo de foto-ekspozicio, urbekskurso, tuttaga ekskurso en la belegan ĉirkaŭaĵon de Veliko Tarnovo k. a. apartenis al la multflanka programo. Intereson trovis ankaŭ la numero de „Paco“ de GDR kaj la filmo „Kvar ĉapitroj GDR“. La soveta delegitaro disdonis tre interesan materialon: esperanta eldono de la konstitucio de USSR kiel aldonaĵo al „Moscow News“. La amaskomunikiloj de Bulgario abunde raportis pri la kongreso.

Renate Levin

★

Skribas s-ro Grigorenko el Poltava:

„. . . En la vicoj de la plej aktivaj en Sovetunio estas poltavaj esperantistoj, kvankam nur en la jaro 1975 ni fondis urban E-klubon, kiu nun estas ne nur urba sed regiona, t. e. Poltava Regiona E-klubo (PREK). La estraro de la Poltava Kulturpalaco de sindikatoj, kie lokiĝas nia E-klubo, kreis ĉiujn necesajn kondiĉojn por enhavriĉa funkciado de PREK, plene subtenas eĉ per mono ĉiujn necesajn por E-progreso niajn entreprenojn. Ekzemple, kun ilia helpo kaj vigla subteno de la urba kaj regiona komitato de Komunisma partio ni organizis en majo 1976 E-renkontiĝon, kiun partoprenis 50 E-aktivuloj el 13 urboj de suda regiono. En kadroj de tiu E-renkontiĝo ankaŭ okazis la unua Konferenco de Ukraina Societo de E-aktivuloj (USEA).“

Esperanto-grupoj el GDR interesataj pri kontakto al Poltava skribu al s-ro Vasilij Grigorenko, Ukraina SSR, SU-314 028 Poltava-28, Krasina 95, loĝ. 16. Li atendas viajn leterojn Esperante, ruse, ukraine aŭ germane.

Jerzy Leyk

Tezoj pri la tezoj

Estimata Redaktoro,

en „de“ n-ro 2/1978 (88) estas publikigitaj tezaj konstatoj kaj proponoj pri „La Esperanto-movado kaj sciencaj esploroj“. La konstatoj pri la okazintaj kaj okazantaj faktoj, kiuj estas plene analizeblaj, estas — miaopinie — bazitaj je relative objektivaj observoj kaj konkludoj. Forĵetante la esperantismajn emociojn oni post pli profunda studo de la fenomenoj pli aŭ malpli frue, ĉiam venos al similaj rezultoj.

Duboj, kiel kutime, naskiĝas transirante al la proponoj por malfacile aŭgurebla estonteco kaj por la taktiko kaj strategio de E-movado. Konkrete en la cetera parto de miaj reagoj al la tezoj mi laŭdas la 5-an punkton, kiu pritraktas proponojn ál la loko kaj rolo de sciencaj esploroj en E-movado. Mi pretas plene konsenti kun la tezo 5. 1. 2., kiu tekstas: „Necesas aldoni al la *agado sciencan komponenton,* por ke entute povas funkcii la *dialektiko inter teorio kaj praktiko.*“ Tamen la faritaj konkludoj por la vojoj efektivigi tion en nacia skalo ŝajnas pli esti subjektivaj deziroj ol rezulto de objektiva analizo de la ĝeneralaj procesoj de la evoluo de scienca esplorado. Tiuspeca analizo, rilate la fenemenon de „Esperanto“ estas ebla nur kondiĉe, ke oni starigos sin ekster la E-movadaj cirkloj kaj ties emociaj balastoj. La analizo efikus tiam inter alie jene:

1. Sciencaj esploroj iel tuŝantaj la temon de internacia lingvo komunikado tre longe stagnis, tamen en la lastaj dek jaroj estas observata aperado de kreskanta stoko da sciencaj publikaĵoj en naciaj lingvoj rilatantaj tiun problemaron, kio pruvas, ke socie la temo pligraviĝas.
2. Ioman kontribuon al la scienca pritrakto de la temo donas ankaŭ la nunaj esplorcentroj formale ne ligitaj kun E-movadaj organizaĵoj sed aktive apogantaj la koncepton pri Esperanto. La direktoj de iliaj esploroj ne multe kongruas kun tiuj de la ĝenerale scienca priokupado de internacia lingva komunikado. La relativan diverĝon kaj izolitecon motivigas tamen la embria stato de tiuj esplorcentroj kaj spirita ligiĝo al la esperantlingva komunumo.
3. La motora, vitala celo de la Esperanto-organizaĵoj el la tipo de Landa-Organizaĵo (LO) kaj la tegmenta UEA estas establi kiel eble plej fortan kaj unuecan Esperanto-komunumon. Pro la ankoraŭa malgrandeco kaj disipiteco de la komunumo ĝi akre rebatis, -as kaj -os iun ajn, eĉ plej malgrandan ŝajnan danĝerigon al ilia vitala celo.
4. Scienca esplorado karakteriziĝas per tio, ke ĝi evoluas nur havante apertecon en siaj konkludoj. Sen kritiko kaj kontraŭtezoj la scienco ne povas progresi. En la aperta pristudo de la internacia lingva komunikado, de Esperanto kiel lingvo kaj movado, vole-nevole naskiĝas rezultoj, opinioj, konkludoj neniel favore akcepteblaj por la tradicia E-movado. Ekzemple pristudante objektive la movadon oni tuj elkovras sakon da mitoj, kiujn la movado flegas kaj kulturas. Ne multe helpos la klarigo, ke tiuj mitoj estas por la konserviĝo de la esperantlingva komunumo nepre bezonaj. La aŭtoron de tiuspecaj konstatoj la movado emos ekskludi. Ja neniu ŝatas esti akuzita, ke li kredas je mitoj. Eĉ la konscio de la plej pintaj gvidantoj, ke la asertoj estas pravaj ne plibonigos la sorton de la aŭtoro ĉar decidas la komunumo kiel tuto. Kaj — tio denove estas objektive pravigebla — la komunumo ne rajtas toleri minacadon al ĝia vitala celo.

5. El tiuj konstatoj oni devas konkludi, ke la proponataj en la artikolo fakaj grupoj enkadre de Landaj Organizaĵoj kaj pli ĝenerale de la LO/UEA tipaj E-organizaĵoj havas treege limigitajn eblecojn gvidi sciencajn esplorojn. La grupanoj estos subkonscie kaj asocie prematajn ricevi rezultojn akcepteblajn de la movada komunumo, ĉar ili spirite kaj formale al ĝi apartenas.
6. Sciencaj grupoj en tiuspecaj E-organizaĵoj apenaŭ povas pliprestiĝigi la opinion pri la organizaĵoj en la okuloj de la ekstera serioza publiko. En la tutlanda socio, en kiu la organizaĵo troviĝas ekzistas difinitaj formoj, lokoj kaj instancoj, de kiuj la socio atendas sciencajn esplorojn, de lingvoamikaj kaj hobiulaj organizaĵoj ion tute alian ol sciencon. La socio aŭtomate malkovros, ke la sciencumado de tiuspeca organizaĵo estas ŝajna kaj subordigita al la aprioraj postuloj de la organizaĵo. Alikaze — kial ĝin ne transprenas destinitaj por tio instancoj?

Sekve de tiuj konsideroj mi forte malkonsilus sciencan priokupon enkadre de LO/UEA tipaj organizaĵoj. Ĝi naskiĝus morta. Ni nur prenu la ekzemplojn de Akademio de Esperanto, CED depost 1973, ISAE. Ĉu ili kapablis realigi la esperojn? Mi ne diras, ke membroj de E-organizaĵoj ne faru sciencajn esplorojn. Jes, ili tion bonvene faru sed en ĝustaj por tiu celo landaj kaj internaciaj *neesperantistaj* institucioj. Fakgrupoj ĉe LO/UEA celantaj sciencan esploradon estas unu el la mit-konstruaj aranĝoj bonaj por E-movado en ĝia nuna stato sed ne multe utilaj al la temo de internacia lingva komunikado.

La dialektikon inter teorio kaj praktiko, la neceson aldoni al la agado sciencan komponenton tiuspecaj organizaĵoj kiel la Esperantaj solvas alimaniere. Ne per esplorado sed per *prezentado* de la esplorrezultoj atingitaj en sciencaj institucioj kaj per *popularigo* kaj diskonigo de tiuj rezultoj, kiuj kogruas kun la celo de la organizo. Tiuspecajn grupojn valoras fondadi ĉe LO/UEA. Tiu celo estas realigebla, utila kaj aplikata far modernaj organizaĵoj. Materialoj, spite la imagojn, utiligeblaj en la prezenta laboro ekzistas sufiĉe kvante, oni nur vizitu bibliotekojn.

Spertoj fari tion en E-movado ankaŭ ekzistas. Ekzemple la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO de pluraj jaroj aranĝas internaciajn seminariojn prezentantajn kaj pridiskutantajn problemojn proksimajn al la internacia lingva komunikado invitante kiel prelegantojn inter alie sciencistojn. La lasta seminario tiuspeca temis pri „Lingvo kaj Demokratio“ (Romo, 1977). Gravas konstati, ke tiuj seminarioj ne okazas sole en Esperanto, sed *inter alie* en ĝi. Bedaŭrinde ĝis nun nur escepte la movado kapablas sekvi tiun vojon.

Mi bone konscias, ke miaj rimarkoj povas nervozigi multajn. Tiuj reanalizu la punktojn 3 kaj 4 kaj ili trovos, ke ilia nervoziĝo estas . . . objektive motivigita.

*

Erich Würker 75-jara

La 26an de decembro 1978 fariĝis 75-jara la membro de Centra Laborrondo, meritplena laborista esperantisto, Erich Würker el Reichenbach.

Ekde la fondo de Centra Laborrondo la jubileulo apartenas al ties plej aktivaj membroj. Multajn jarojn li gvidis la Distriktan Laborrondon Esperanto Karl-Marx-Stadt. Multloke ankaŭ jam antaŭ 1965 liaj aktivecoj portis riĉajn fruktojn. Al la jubileulo CLE deziras ankoraŭ longan sanan bonfarton kaj al ni pluan agrablan kunlaboron. CLE

Pri nia nuna pozicio en Kulturligo

Certe ni rajtas konstati ke la esperantistoj samrajte agadas en Kulturligo kaj nia lingvo akiris firman lokon. Nur la grado da reputacio de nia esperantistaro ne jam akordas al ĝia vera signifo. Ankaŭ tio kaŭzas en certaj funkciulaj rondoj tiujn konatajn antaŭjuĝojn. Sed pro tio ni mem kulpas! D-ro Blanke en sia artikolo („d e", 1978/3-a n-ro, p. 6) listigis kelkajn mankojn de nia agado. Jen mia opinio pri pluraj el ili:

1.

Iomete ni restadu ĉe supre menciita artikolo. Daŭrigo de ĝi probable aperos en sekvonta numero de „der esperantist", t. e. tro malfrue por helpi ĝustatempe prepari la III-an Centran Renkontiĝon kaj ties decidojn. Estus dezirinde estonte pli frue aperigi tiajn gravajn materialojn, por ke la tuta esperantistaro partoprenu disputon. Nur tiele ni atingos fruktodonan diskuton kaj interesiĝon pri la ĉefaj problemoj flanke de ĉiuj esperantistoj.

2.

En la artikolo estis konstata la lingva nesufiĉo de multaj esperantistoj kompare al la internacia nivelo. Tio estas ĝusta, sed al la eldiro mankas la esenca: la kialoj!

Tiuj nuntempe oficiale disponeblaj libroj lingvaj (lernolibro, gramatiko) ne sufiĉas al la postuloj de moderna lingva instruado. Niaj Esperanto-instruistoj ĝenerale tre bone regadas la lingvon, sed multaj el ili ne scias pedagogiajn principojn. Didaktiko por tiuj ŝajnas firme kaŝita trezoro. Tial per kursoj, aparte per korespondaj kursoj oni ne atingas regadon de la lingvo. La lernigaj leteroj por korespondaj kursoj, laŭ mi, nur sufiĉas al la postuloj, se iu studanto de Esperanto aŭ tre bone regadas la gepatran lingvon aŭ eble jam alian lingvon. Ne pretervideblaj estas tiuj klopodoj de CLE plialtigi lingvan nivelon per intensaj kursoj, sed tio ne sufiĉas, ĉiuj distriktaj kaj lokaj estraroj devos multobligi siajn klopodojn eduki pli ol ĝis nun kursgvidantojn. Solvado de tiu tasko fariĝu tutorganizaĵa afero. Niaj Distriktaj Laborrondoj pasinte ne ĉiam sufiĉe inkluzivis partoprenintojn de tiaj kursoj en lingvan instruon. Por inversigi tiun ĉi staton kaj plibonigi kursan instruon mi proponas:

- Ĉiu DLE elektu el kursanoj taŭgajn personojn, por kapabligi ilin gvidi kursojn, se ankaŭ temos nur pri du, tri aŭ kvar kandidatoj.
- Tiuj, al la grupoj apartenantaj pedagogoj lernigu pedagogiajn, kaj didaktikajn kaj metodikajn principojn al kursgvidontoj.
- CLE ĝeneraligu instruajn spertojn kaj publikigu „instruan helpilaron".
- Antaŭ ĉio nia esperantistaro urĝe bezonas lingvajn librojn laŭ la plej freŝa stato de la pedagogia kaj esperantologia esplorado, ekz., lernolibron, gramatikon ktp.

3.

Paso de multaj kunvenoj ofte ne kontribuas al lingva perfektiĝo. La plejoj komenciĝas per esperantlingva parolado, sed jam la diskuto okazas germanlingve. Certaj „spertuloj" ĉiam asertas, komencantoj aŭ komencintoj ne komprenus iun nur-esperantlingvan interparolon. Sed kiel fari

el komencintoj spertulojn, se ne per daŭraj esperantlingvaj konversacioj? Trovi ĝustan dimension kaj plej bonan metodon estu la unua tasko de la „spertuloj".

4.

Fine de iu kurso gvidanto pritaksas konon de la partoprenintoj per ... ja, per kia mezurilo? Li ja ne disponas pri ekzamena sistemo ekzakta!

— Estu la unua el la antaŭrangaj taskoj ellabori kaj publikigi ekzamenan sistemon laŭ internaciaj postuloj.
— Por estonte partopreni centran intensan kurson, la pruvo de sukcesa ekzameno estu antaŭkondiĉo.

5.

Esenca manko de nia agado estas senpublikeco. Agadi kadre de la bazaj taskoj de Kulturligo ankaŭ signifas flegi tradiciojn de la laborista Esperanto-movado. La gazetaro ne plu bezonas sciigojn de esperantistoj, tion havigas rapide kaj amplekse socialismaj novaĵ-agentejoj. Sed kial esperantistoj ne aperigas spertojn, informojn el siaj korespondadoj? Raportoj, ekz., pri porpaca batalo el persona sfero de alilandaj amikoj pozitive influus nian edukan klopodon. Cetere, nia gazetaro estu pli spirite akceptema kontraŭ niaj problemoj. Ĉi-rilata sukceso de CLE en la centra gazetaro malfaciligus agadon de DLE. CLE faru ekzemplon, kelka distrikta redaktisto bezonas tion. Pli da publikeco helpos veki pli da interesiĝo kaj kontakti sindikatajn kaj junulara-movadajn estrarojn por plibonigi socialan strukturon kaj akceli kreskadon de junulara movado esperantista. Scio pri Esperanto kaj ties ebloj ne plu akumuliĝu inter esperantistoj, sed disvastiĝu inter laboristoj kaj junuloj. Konvencioj pri kunlaboro inter CLE kaj sindikatoj kaj Libera Germana Junularo estus alstrebindaj.

6.

Grava demando koncernas la centran informilon. Lasttempe „der esperantist" tro emfazis interlingvistikajn problemojn. Kvankam ili estas gravaj, la simpla esperantisto trovis nenion, preskaŭ nenion por sia ĉiutaga lingva uzado. Ni serioze pripensu kiel plivastigi la centran informilon al revuo, forumo de ĉiuj esperantistoj. Sufiĉan nombron da kunlaborontoj oni serĉu kaj ilin trovos.

Mi ĝojus, se ĉiuj movadaj interesuloj dirus siajn opiniojn.

Wolfgang Göpel, Wolmirstedt

Ni funebras

— pro la forpaso de d-ro Ludoviko Izák, nestoro de la slovakaj esperantistoj. D-ro Izák forpasis 79-jara, la 15an de septembro 1978 en Martin.
— pro la forpaso de la laborista esperantisto Walter Dietze, la 10an de novembro 1978, el Großpösna. La forpasinto havas grandajn meritojn pro la kunrekonstruado de la Esperanto-movado en la distrikto Leipzig kaj pro sia aktiveco en MEM.

Iom da komento

En multaj punktoj oni certe povas samopinii kun s-ro Göpel, des pli ĉar similajn ideojn oni ne aŭdas unuan fojon, kaj ili ne estas fremdaj al CLE kiu ekzistas jam 13 jarojn. Tamen oni iom devas komenti:

1. Plibonigo de la lingva scio kaj metodika kvalifiko (la rimedojn s-ro Göpel prave mencias) dependas unuavice de kunlaborantoj, kiuj pretas ion konkretan entrepreni. La metodika-pedagogia fakgrupo sub gvido de d-ro Dahlenburg faras siajn eblojn.

   Lernolibro kaj helpiloj por kursgvidantoj kaj memstudantoj (koresponda kurso) aperos fine de 1978, komence de 1979.

2. Ne eblas tro rapide disponigi „lingvajn librojn laŭ la plej freŝa stato de la pedagogia kaj esperantologia esplorado", ĉar a) ili internacie apenaŭ ekzistas, b) iu devus ilin sekve ellabori, c) por presi tiaĵon oni bezonas paperon.

3. Ellaboro de ekzamenaj postularo kaj sistemo estas prava postulo. Pri ĝi okupiĝos la metodika-pedagogia fakgrupo en 1979.

4. Pri la redakta politiko de „der esperantist" oni povus longe diskuti kaj al neniu plene plaĉos.

   Oni ne forgesu, ke „der esperantist" estas fakĵurnaleto (kvankam subtitole „informilo") de la esperantistoj de GDR. Ŝajne, ke la emfazo de sciencaj aspektoj estas tre grava kaj ne troigita, despli, ĉar ties signifon ankaŭ kompreni devas la „simpla esperantisto". Tiu „simpla esperantisto" reprezentas plejofte la funkciulon de la nuntempa movado.

   Ne estas tute kompreneble, pro kio la „simpla esperantisto trovas nenion, preskaŭ nenion" por sia ĉiutaga uzado.

   Eble oni devas atentigi, ke „der esperantist" estas nur **unu** revuo esperantlingva, abonebla en GDR. Por lingvaj ekzercoj do ne nur ekzistas „der esperantist".

5. Cetere, neniam ni plendis pri manko de kunlaborantoj por „der esperantist". Kvankam ĉiam estas bonvenaj novaj kontribuantoj, la ĉefa problemo ne estas, kiel trovi taŭgajn manuskriptojn (feliĉe), sed la fakto, ke „der esperantist" sur 6 x 24 paĝoj dum jaro prezentu ion pri esperantista agado en KL, distro, lingva kvalifikigo, pedagogio, interlingvistiko, internacia movado, gvidagado k. t. p., k. t. p. Kompreneble, tian miraklon ni ne sukcesas fari.

D. B.

*

Neues Esperanto-Lehrbuch

Bestellen Sie das neue Esperanto-Lehrbuch rechtzeitig **in Ihrer Buchhandlung:** Till Dahlenburg / Peter Liebig: „Taschenlehrbuch Esperanto", Verlag Enzyklopädie, Leipzig, 1978, Bestell-Nr. 576 6114.

Bezirksarbeitskreisen, Kreisarbeitsgruppen und Kursen empfehlen wir Sammelbestellungen. Über den Zentralen Arbeitskreis Esperanto wird das Lehrbuch nicht vertrieben.

SEFT: Somera Esperantista Familia Tendaro '78 kaj '79

En la distrikto Neubrandenburg GDR kunvenis aŭguste 78 meze en ĝia bela lagaro grupo de esperantistoj el Hungario kaj GDR.
Ili pasigis en tiu pitoreska regiono agrablajn tagojn en esperantista etoso.

Pro la granda sukceso de tiu eksperimento la partoprenintoj decidis alvoki la naturamikojn en la jaro 1979 organizi samspecan tendaron.

La SEFT '79 okazos ekde 18a ĝis 25a de aŭgusto 1979 sur la tendejo C – 86 en arbaro ĉe Thomsdorf en regiono de Feldberg. Kio do estas la organizaj detaloj?

- Ĉiu partoprenonto devas mem zorgi pri sia tendo, manĝado, necesaj tendaĵoj k. t. p. Kiel unikan servon la Distrikta Laborrondo Esperanto Neubrandenburg nur peras la adresojn inter ĉiuj interesuloj kaj donas kelkajn informojn pri la regiono, vojaĝeblecoj kaj aliaj detaloj.
- La esperantistoj el GDR devas aliĝi je *„Campingplatzvermittlung, 206 Waren, Am Kietz 14"* – tio okazu minimume januare 1979!
- La eksterlandanoj simple aliĝos post alveno je la oficejo de la tendaro. (La aliĝo nur eblas por civitanoj el la socialismaj landoj.)
- Partopreni povas ĉiu, kiu deziras pasigi sian ferion en romantika naturo (lagoj multas, arbaro grandas) sen ĝenoj kaj sensacioj. Nur ili serioze interesiĝu pri Esperanto; kiu ne povas aŭ ne volas paroli en Esperanto tiu bonvolu ne veni.
- Pri la programo la partoprenontoj ĉiutage mem decidas, memkompreneble nek ekzistas oficiala programo nek estraro de la tendaro.
  Jen kelkaj proponoj:
  - Kelkaj interesaj promenoj tra la sovaĝa naturo aŭ turismaj vojetoj
  - bani sin kun aŭ sen bankostumo (preskaŭ ĉie eblas)
  - ludo kaj sporto, eventuale fiŝkaptado
  - organizo de komunaj vesperoj
  - per aŭtomobilo eblas vizito de kelkaj proksimaj urboj (Feldberg, Neustrelitz, Neubrandenburg, Templin, Lychen, Burg Stargard kaj aliaj)

Kontraŭ 2,– M vi ricevos mapon de la koncerna regiono (1 : 30 000), interesuloj el aliaj landoj sendu esperantistan libron de simila valoro.
Jen la adreso de la estro de la Distrikta Laborrondo Esperanto:
GDR - 20 Neubrandenburg, Leibnizstraße 5/67, s-ro Werner Pfennig.

★

Divorckaŭzo

Dum divorca procezo en Paris la akuzantino plendis: „De kiam li estas arbitraciulo li neniam konfesas, ke li eraris. Kaj se mi tamen iam protestas, li fajfas tiel laŭte, ke la najbaroj alkuradas."

★

Precizeco

Viena tajloro ĉe lignaĵisto mendis aparte grandan ŝrankon. Zorgeme tiu mezuris la ŝtuparejon kaj koridoron de la mendinto por ke la monstro sendifektite estu transportebla en la tajlorejon. Kiam la meblo estis preta kaj liverenda ĝi ne trapaseblis la lignaĵejon.

2a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco (IMEK)

La Universala Medicina Esperanto-Asocio, la Medicina Fakkomisiono de IIEA kaj ĝia fakgrupo aranĝos la 2-an IMEK en urbo Hódmezóvásárhely (Hungario) inter la 8a kaj 14a la de julio 1979.

La konferencaj ĉeftemoj: 1. Sanitara prizorgado kaj sociala asekurado.
2. Protektado de la medio.

Gekolegoj, kiuj deziras prelegi dum la 2a IMEK, estas petataj skribi al la Organiza Komitato, menciante la titolon de la planita prelego.

En la kadro de la 2a IMEK okazos krom la sciencaj prelegoj vizito de muzeoj kaj sciencaj institutoj, diversaj kulturaj programoj (balo, folklora vespero, modrevuo) kaj du ekskursoj.

La partoprenkotizo estos ĉ. 900 — 1400 forintoj laŭ kategorioj.

La Organiza Komitato de la 2a IMEK alvokas la esperantistajn kuracistojn, farmaciistojn kaj ĉiujn aliajn medicinistojn ĉeesti la Konferencon.

Aliĝiloj kaj detalaj informoj estas riceveblaj ĉe la: Organiza Komitato de la 2a IMEK, Katalin Faragó, prezidantino, Poŝtkesto 89, Hódmezóvásárhely (Hungario) H-6801.

La urbo Hódmezóvásárhely situas en la suda parto de Hungario, proksime al urbo Szeged. En la urbo vivas multaj famaj geartistoj.

D-ro Imre Ferenczy
sekretario de UMEA

★

Diplomlaborajo pri UEA

La konata junulara aganto de la sovetunia Esperanto-movado Paŭlo Jegorovas el Vilnius sukcese („tre bone") defendis sian diplomdisertacion pri la temo „Internacia Jura statuso de Universala Esperanto-Asocio".

La scienca gvidanto estis prof. d-ro Pr. Kúris, justicministro de Litova SSR. La oponanto — kandidato de juraj sciencoj M. Poĵarskas, vicprezidanto de la Ŝtata komitato de Ministra Kosilantaro de Litova SSR pri eldonejoj, poligrafio kaj librokomerco. La universitato ĝuste nomiĝas jene: Vilniusa Ŝtata Universitato Labor-Ruĝ-Standard-Ordena je la nomo de V. Kapsukas, Katedro de historio kaj teorio de ŝtato kaj juro. La plano de la laboro estas jena:

Enkonduko.
Ĉapitro I: Ĝenerala priskribo kaj historia skizo de UEA.
a) konciza historia skizo de UEA
b) ĝenerala priskribo de UEA
c) trajtoj de nuna strukturo de UEA
Ĉapitro II: UEA kiel Internacia Neregistara Organizaĵo.
a) nocio de Internacia Neregistara Organizaĵo
b) internacia jura statuso de UEA
Ĉapitro III: Agado de UEA en formado de la monda publika socia opinio.
Finkonkludo
Amplekso — 63 tajpitaj paĝoj.

Unuafoje ni ekscios pri

Esperanto en la bibliotekoj

Kion oni faris kaj atingis por kolekti, prilabori, konservi kaj ebligi utiligon de E-verkoj, pri informado, bibliografiado, pri klasifaj sistemoj. Kia estas la stato de la interlingva (precipe Esperanta) literaturo en publikaj, societaj kaj privataj E-bibliotekoj kaj muzeoj; pri aperintaj katalogoj, bibliografioj k. t. p. tion oni povos ekscii el la laŭaspekte tre modesta sed enhave valora broŝuro, kiun kompilis bibliografo kaj leksikologo Marinko Ĝivoje (YU-410 40 Zagreb-Dubrava, P. p. 5025, Jugoslavio). De proksimume 50 registritaj bibliotekoj pri dudeko de plej grandaj ni ekscios ankaŭ jenajn datojn: 1. Preciza titolo kaj adreso, 2. kiom da libroj kaj kiom da binditaj jarkolektoj (en metroj de bretlongo) ĝi havas, 3. ĉu vizito, legado kaj prunteprenado ebla, 4. ĉu ekzistas sliparo, katalogo, 5. ĉu ekzistas duoblaĵoj k. t. p. Krome kun kiaj problemoj la biblioteko renkontiĝas. La kompilinto petas sendi tiajn informojn ankaŭ pri bibliotekoj al la supra adreso. Estu konsideritaj nur bibliotekoj kun minimume 1000 libroj aŭ proksimume 10 metroj de bretlongo.

La broŝureto estos havebla kontraŭ pago de nur efektivaj kostoj.

Marinko Ĝivoje *(Budapeŝta Informilo 5/78)*

★

Terminaraj laboroj en Ĉeĥoslovakio

Elektroteknika faka grupo ellaboradas Esperantan parton de plurlingva vortaro PASIVAJ KOMPONANTOJ por ELEKTROTEKNIKO eldonota en TESLA Lanŝkroun. La laborojn pri la E-parto koordinas: F. Hort, Palackého 764, CS-563 01 Lanŝkroun.

La nomenklaturon de HIDRAŬLIKAJ MEKANISMOJ prilaboris J. Rybàr, Kollárova 1131/11, CS-36301 Ostrov nad Ohři.

Tre aktive laboras la ĵus fondita laborgrupo por AERONAŬTIKA TERMINOLOGIO. Ili planas kompili terminaron kun ĉ. 1000 terminoj. Kunlaborantoj anonciĝu ĉe Z. Myslivec, CS-512 13 Bozkov 110, okr. Semily.

Seplingva BOTANIKA ILUSTRITA VORTARO prilaborata de F. Mlynar, Kránická 689, CS-563 01 Lanŝkroun, ampleksas jam 5000 terminojn kaj la finpretigo de la manuskripto estas supozata en 1981.

Redaktado de ĉ. 30 mil slipoj kun teknikaj terminoj progresas daŭre. Prizorgas ĝin inĝ. A. Bednařik, prezidanto de STS de AESSR.

(Laŭ „Budapeŝta Informilo“ 5/78)

★

Lingvistika Revuo kun nova nomo

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED), ĉe UEA, ekeldonadis en la jaro 1969 la lingvistikan revuon „La monda lingvo problemo“ (LMLP), kiu publikigis nacilingvajn artikolojn pri diversaj aspektoj de la internacia lingva problemo kun ampleksaj resumoj en Esperanto.

Sub tiu titolo (LMLP) aperis entute 18 kajeroj (ĝis 1976). Ekde 1977 la revuo novtitoliĝas „Lingvaj problemoj kaj Lingva Planado“ (LPLP). De tiu nova serio aperis ĝis 1978 3 kajeroj.

La revuo ekzistas en „Deutsche Bücherei“, Dresden.

Bona starto de la E-grupo „Progreso“ en Magdeburg

La invitilo — laŭ grafika vidpunkto efike formita kaj laŭ enhavo promesplena — ne trompis:
La 1-a renkonto de la Esperantistoj de la distrikto Magdeburg plene kontentigis la 30 partoprenintojn el la distrikto, de la urbo mem, el Leipzig kaj Berlin kaj el Bulgara Ŝumen la reprezentantoj s-ro Cvjatko Todorov kaj s-ro Dimiter Minĉev — estro kaj sekretario de la E-societo „Vekiĝo“.
Sendube kulmino de la aranĝo estis la subskribo de amikeca kontrakto inter la E-societo „Vekiĝo“ kaj la E-grupo „Progreso“ el Magdeburg.
Post la subskriboj kaj interŝanĝo de donacoj sekvis 2 aliaj ne malpli interesaj programeroj fare de d-ro D. Blanke kaj s-ro Dungert pri la 63-a UEK en Varna spicitaj per sonbendigitaj kongresaj salutparoladoj kaj lumbildoj.
La komunan tagmanĝon sekvis rigardado de la katedralo kaj de la monaĥinejo „Niaj Karaj Sinjorinoj“ sub gvido de samideano Göpel.
En la „Monakineja Kafejo“ finiĝis la viviga starto de la E-grupo „Progreso“ al kiu oni nur povas danki kaj deziri pluan progreson.
Sed ne estu forgesata la ekspozicieto en la Kulturliga Domo pri la 63-a kaj multaj antaŭaj UK-oj, kiun aranĝis la bulgaraj gastoj.

★

Aktivecoj de Esperantistoj de distrikto Suhl okaze de la 17a Festivalo de Laborista Kulturagado

Ĉiu esperantisto de nia distrikto agis aktive por prepari la 17an Festivalon de Laborista Kulturagado. En uzinoj, lernejoj kaj diversaj organizaĵoj i. a. ankaŭ en Kulturligo de GDR ni plenumis la tre multajn taskojn, por ke la 17a Festivalo tute sukcesu. Kaj la rezultoj pruvis, ke niaj penadoj estis gravaj kaj ĝustaj. La esperantistoj aranĝis ekspoziciojn en la domoj de germana-soveta amikeco en Suhl kaj en Hildburghausen. Per tiuj ĉi ekspozicioj ni montris la signifon de la Esperanto-movado en Germanio antaŭ la dua mondmilito kaj en GDR por klasbatalo, kontraŭ ekspluato kaj milito. Per tiu ĉi artikolo mi volas danki al ĉiuj, kiuj helpis nin per materialoj kaj konsiloj. La ekspozicio en Suhl sendube pozitive influis la evoluon de nia Esperanto-movado en la distrikturbo. Plie ni tradukis prospekton pri Oberhofa botanika ĝardeno. Ĝi baldaŭ aperos.

W. Röhrig

Esperantista renkontiĝo en Havanna

Dum la XIa Festivalo de la Junularo kaj Stúdentoj, kiu okazis fine de julio 1978 en Havanna, Kubo, ankaŭ esperantistoj renkontiĝis. La festivala komitato oficiale komisiis kubanan esperantistinon esti interpretistino por la partoprenintaj esperantistoj el FRG, Hungario, Nederlando kaj Svedio.

Kuba gasto en GDR

Unu el la aktivuloj de la formiĝanta Esperanto-movado en Kubo, René Valdés Lopéz vizitis dum aŭgusto kaj septembro 1978 GDR. Post partopreno en somera kurso por instruistoj de la germana lingvo en Dresden, René Valdés renkontiĝis kun membroj de CLE en Berlin. (Kp. ankaŭ la artikolon en „de“ 4/78, p. 10—11.)

K r u c v o r t e n i g m o

Helpo: r = radiko. — **Ĉ:** API. — **D:** UO, AA. — **1:** Liki. — **3:** Ku. — **4:** Ons. — **9:** NTS. — **10:** OO. — **11:** Ka. — **13:** Leti. — **16:** Srem. — **17:** Ain. — **18:** Yo, tonal.

Horizontale: A. Eminenta hungara E-verkisto, poeto kaj tradukisto (1891 ĝis 1976) — **B.** Nuntempa kontrakto inter ŝtatoj / literaturaj homigoj de abstraktaj ideoj — **C.** Situacio r / parto de floro r / prepozicio / senkolora gaso C_2H_4 r / senprokraste — **Ĉ.** Prezenti al si en la spirito r / pastra promeso r / lina teksaĵo r / mallongigo de pola presagentejo / elĵeti tra la buŝo enhavon de la stomako r / antaŭe neekzistinta — **D.** Inflamo de mukozo r / formulo de urana oksido / granda domaro r / havanta kvaliton de ekstrema parto de io / mallongigo de usona flugkompanio / karesema (neologisme) r — **E.** Rilatantaj kultobjektojn / devenanta el la plej granda mondparto / plektaĵo kun grandaj interspacoj / speco de diversaj kemiaj elementoj (ekz. fero, oro) — **F.** Bonimprese al nazo / batalo inter du personoj r / membroj (sen o) / rigidigaĵo por tolaĵo — **G. Poemaro tradukita far poeto sub A el 22 lingvoj** — **Ĝ.** Tiu kvanto.

Vertikale: 1. Tralasi likvaĵon el ujo — **2.** Migranto sen konstanta sidejo — **3.** E-a nomo de litero q / negativa elektrodo r — **4.** Hispana insulo / sekrecio de hepato — **5.** Ano de ĉe-balta nacio r / malofte — **6.** Narkota substanco / malgranda vazo (sen o) — **7.** Materialo por fabriki bieron / ripete — **8.** Rapide graviĝanta (ekz. malsano) r / procentego r — **9.** Mallongigo de nigeria televida kompanio / sunaperejo r — **10** Mallongigo sur belgaj aeroplanoj / forigi per balailo — **11.** Urbeto en Zairio / afrikaziano (kun artikolo) — **12.** Du vicoj de arboj r / efektivigi (sen i) — **13.** Indonezia insulo / komenci batalon r — **14.** Havanta formon de angulo kreita de du arkoj / orkolore — **15.** Malnova mezurunuo de longeco / daŭranta korinklino (sen o) — **16.** Jugoslava malaltaĵo / ĉefafero de parolado — **17.** Franca departemento / klare — **18.** Hispane „mi“ / skalo kaj akordoj kun tonrilatoj grupiĝantaj ĉirkaŭ toniko r — **19.** Multekosta ornamaĵo — **20.** Tempa mezurunuo.

Adolf Staňura



Rakonto de Böll aperis

La konata rakonto de la federacigermana nobelpremiito Heinrich Böll „La perdita honoro de Katarina Blum“ ĵus aperis ĉe Edition Leipzig en Esperanto. Ĝin tradukis Richard Schulz el Federacia Respubliko Germanio, do ne miksenda kun d-ro Karl Schulze el GDR. La 154 paĝan libron oni povas mendi per la librovendejoj. Mendo-numero 592 6739. Recenzo aperos en unu el la sekvantaj numeroj de „der esperantist“.

★

Artikolo pri Esperanto-teatroj en „Theater der Zeit“

La organo de la asocio de teatroagantoj de GDR publikigis en sia numero 10/1978, p. 79, detalan artikolon pri „Esperanto-teatroj“ de Wera Paintner-Dehler. La verkintino partoprenis la 63an UK en Varna.

★

Übersetzer-Gruppe

Die Ausbildung und ständige fachliche Weiterbildung von guten Esperanto-Übersetzern in der DDR, die in der Lage sind, literarische Werke ins Esperanto zu übertragen, wird immer mehr zu einer dringenden Notwendigkeit. Wir schlagen daher vor, daß sich alle literarisch aktiven Esperantisten in einer Interessengruppe zusammenschließen und in engen Erfahrungsaustausch treten. Alle Interessenten, die an der Mitarbeit in einer solchen Gruppe interessiert wären, mögen sich an den Zentralen Arbeitskreis Esperanto wenden.

Die Red.

★

Du artikoloj en „Junge Welt“

En la ĉeforgano de „Freie Deutsche Jugend“ (Libera Germana Junularo) en mallonga sinsekvo aperis du artikoloj pri la 34a TEJO-Kongreso en Tirnovo: la 3-an (Lennartz) kaj 10-an (Hamann) de aŭgusto 1978.

★

Intensa Kurso en Halle

De 15. — 21. 10. 1978 en Halle hungara lektorino gvidis intensan kurson, kiun partoprenis 27 personoj. S-ino Zsuszanna Barcsay el Budapest, diplomito pri esperantologio (ĉe prof. Szerdahelyi) eminente gvidis la kurson kaj donis valorajn instigojn por la plua lingva pliperfektiĝo de la kursanoj.

★

Atentigo pri grava eraro

En la libro „Esperanto: Lingvo, movado, instruado“ enestas kelkaj gravaj bedaŭrindaj tajperaroj. Ni aldonis korekto-liston. Sur tiu listo bedaŭrinde mankas unu grava korekto: Sur paĝoj 114/115 la vorto „sensaciismo“ devas esti ŝanĝata en „sennaciismo“.

Ĉe esperantistaro de Jalta

Sur suda parto de duoninsulo Krim ĉe la Nigra Maro situas mondkonata sovetlanda klimata kuracloko Jalta. Belega ĉirkaŭaĵo, milda klimato, ĉarma, plej kvieta en la mondo maro altiras al nia urbo ĉiu-jare pli ol 1,5 milionojn da sovetlandaj kaj multmilojn da eksterlandaj (de ĉiuj kontinentoj) feriantoj kaj turistoj. En la malgranda urbo estas 5 mondfamaj sciencaj institutoj-organizaĵoj.
Komence de 1945 Jalta estiĝis ankaŭ historia urbo — urbo de la Pac-konferenco de 3 potencaj ŝtatestroj.
Sekve en Jalta Esperanto estus valora helpilo por interkompreniĝo, se gastoj de Jalta, des pli de la internaciaj tendaroj por infanaro „Artek“ kaj por junularo „Sputnik — (ambaŭ estas ĉe vilaĝo Guzzuf — 12 kilometrojn for de Jalta) — regus Esperanton.
Bedaŭrinde ni, Jaltanoj ĉiu-jare renkontiĝas nur kun 5 — 6 eksterlandanaj samideanoj.
Kaj nia propagando de Esperanto estas vana, ĉar kontraŭuloj de la lingvo prave diras, ke nur guteto de eksterlandaj gastoj posedas Esperanton, do por kia celo studi ĝin, pli utila estas la germana kaj la angla.
Tamen ni sukcesis fondi en Jalta oficiale Esperanto-klubon „Mevo“ en la kadro de la klubo de maristoj.
Ni interkorrespondas kun samideanaro el 32 landoj kaj aktive partoprenas la agadon de la fakoj de asocioj de amikeco de Sovetlando kun GDR, Jugoslavio, Italio, Francujo kaj Britujo kaj Hungario. Ni aranĝas vesperojn kaj ekspoziciojn pri ĉi-tiuj landoj kaj pri niaj najbaraj landoj: Finnlando, Pollando, Bulgario, Rumanio.
Ni kore invitas gesamideanojn de terglobo, se vi aŭ viaj gekonatuloj vizitos Jalton, „Artek“ aŭ „Sputnik“, kontaktiĝu kun la esperantistaro de Jalta.
La klubo de maristoj situas ĉe la monumento de V. I. Lenin apud la ĉefa poŝto, kaj la palaco de pioniroj situas en la mezo de la urbo.
Bonvenon en Jalta.

Mihail Cimberov
334 233 Jalta/Sovetunio
Krivosti 21 - 22

*

Intervjuo kun Paul Ariste

En la germanlingva soveta revuo, aperanta en Aŭstrio, „Sowejetunion heute“ n-ro 7/8 (859/860) 1978 la ĵurnalisto Aleksander Harkovski intervjuis la internacia konatan sovetan lingviston prof. d-ro Paul Ariste, membro de la Akademio de Sciencoj de la Estona SSR. En la intervjuo „Esperanto, die Fremdsprache für alle“ (Esperanto, la fremdlingvo pro ĉiuj), la lingvisto, kiu lernis Esperanton ekde la 14a vivojaro kaj konas dekojn da lingvoj, sin tre engaĝis por la internacia lingvo.

*

Interesa iniciato

La distrikta Laborrondo Schwerin eldonis simplan sed enhavoriĉan faldfolion „Politikaj legaĵoj“ kun artikoloj pri Gorki (Gorki pri Esperanto), la rolo de la portugalaj koloniistoj, la novnaziismo en FRG kaj pri „homaj rajtoj en Saŭd-Arabio. La materialo respondas al reala bezono. Interesuloj ricevas la materialon ĉe CLE aŭ ĉe s-ro Hans Dietrich, 27 Schwerin, Von-Thünen-Straße 42.

Filatelo kaj Esperanto

Nova Esperanto-poŝtmarko

Bulgara poŝto eldonis la 13. 7. 1978 memore al la 63a Universala Kongreso de Esperanto en Varna poŝtmarkon en nominalo de 13 stotinkoj. Akompanas ĝin poŝta Unuataga Koverto kaj speciala unuataga stampo de Sofia 1000. Ili estas presitaj en folioj kun po 20 poŝtmarkoj. La eldonon iniciatis Bulgara Esperanto Asocio. Laŭvice ĝi estas la 54a E-poŝtmarko en la mondo. (Enkalkulitaj estas ankaŭ ĉiuj variaĵoj.)

Poŝtaj Esperanto-tutaĵoj

Bulgara poŝto aperigis 3 novajn „tutaĵojn" pri Esperanto:
- poŝta koverto en nominalo de 2 stotinkoj kun la surpreso „63a monda esperantista kongreso Varna 1978" en bulgara lingvo
- poŝta koverto en nominalo de 2 stotinkoj kun la surpreso „10a jubilea ĉefkunveno de IPTEA, Varna, Bulgario" en Esperanto
- poŝta karto en nominalo de 1 stotinko kun la surpreso „Esperanto — lingvo de paco kaj amikeco" en bulgara lingvo.

Pluraj filatelistoj sciigis, ke estis komplike eltrovi pro mankantaj informoj oficialaj, ĉu tiuj eldonaĵoj estis poŝtaj aŭ ne.

Nova stampo-katalogo

Esperanto Ligo Filatelista aperigis nove prilaboritan katalogon pri poŝtaj E-stampoj ĝis 1978. Tiu katalogo notas 536 poŝtajn stampojn el 30 landoj plus 93 variaĵojn. Krome oni trovas en ĝi informojn pri afrank-stampoj, poŝtkontoraj stampoj k. a., liston de reko-glumarkoj, liston de E-poŝtmarkoj kaj avertojn pri nefilatelaj eldonaĵoj.

★

Murdema koko

En Sarzana apud La Spezia, Italio. koko pafis je kvar homoj. Kiel la polico raportis, la koko en bienkorto promenis trans dutuba kugletaĵa pafilo kaj hazarde tuŝis la ĉanon. La pafo trafis la nesingardan posedanton, ties edzinon kaj ambaŭ filojn, sed bonŝance neniu estis serioze vundita.

Hazarde

Parolanto de radiostacio en New York misprenis la tekston por anonci la sendotan televidan filmon anstataŭ la finvortojn por la sendita vetera prognozo. Tialmaniere aŭdiĝis: „Eblaj similaĵoj kun veraj okazintaĵoj estas tute hazardaj!"

Pafistoj

En Brisbane (Aŭstralio) ĉe riverbordo sinjoro observis viron starantan kun pistolo. Memmortigonto! li pensis kaj provis senarmigi la alian. Li sukcesis. Tamen antaŭe eksplodis pafo. Tialmaniere la remboata konkurso estis precize startita. *(Kompilis Linde Knöschke)*

Claus Zander

Eminenta vizito

„Do, Edgaro, nun kontaktigu la lampojn en la lustro. Ja vi ĉiam ŝraŭbe malkontaktigas ilin por ŝpari elektron.“

„Nu jes, mi tuj faros“, Edgaro paroletis, „sed zorgu pri la manĝaĵo. Kion vi aĉetis, ĉu kokon aŭ anason?“ Luiza tondre ekridis kaj imitis moke: „Ĉu kokon aŭ anason? Memkompreneble meleagron! Tiom la afero valoras al mi!“

„He, Luiza, forprenu la kovraĵon de la foteloj. Tio ne estas laŭ ĉies plaĉo. Ja ni ne volas aspekti malmodernaj. Kaj . . . kion mi ankoraŭ volis diri: Vestu vin iom pli alloge, ĉu? Tio plaĉas al viroj.“

„Jes ja, vi pravas kaj mem vestu ion novan. Memkompreneble diskretan! Ne montru aristokratecon — aŭ li tuj malŝatos nin!“ „Luiza, ĉu la taksio vere venos? Ĝi ne venu tro malfrue! Ankaŭ ne tro frue.. . .“

„Mi scias, mi scias, takto, takto, takto! Zorgu pri viaj taskoj. Ĉu vi havigis al vi trinkaĵojn? Sovetan vodkon? Radebergan bieron?“

„Hahaha, Radebergan! Ĉeĥan mi alportis! Ĝi memkompreneble estis multekosta sed . . .“

„Ho jes, kiu parolas pri multekosto? Tiun avaron vi neniam perdos! Li sin sentu bone ĉe ni! Ĉu vi elmetis iujn gramofondiskojn? Herbert Roth aŭ simile?“

„Mi faris, mi faris. Eĉ ion apartan mi trovis: Marŝmuzikon! Kaj ĉi tie, rigardu: Dudekmarka memora monero pri Heinrich Mann, estu donaco, por tiel diri.“

„Ho, bele. Vi estas anĝelo, Edgaro! Vi pensas pri ĉio. Sed diru, kioma horo estas? Jam la naŭa! Nun li baldaŭ venos, la instalisto!“

Trad. T. M. Lennartz

★

„Salutoj de amikoj“

Skribas nia leganto s-ro Clifford H. Brown el Novzelando:

„De mia fidela plumamiko, Rudolf Eichler de Schwarzenberg, mi regule ricevas ekzemplerojn de la ĵurnalo kiun vi tiel kompetente redaktas. En n-ro 85 (5/1977) kiun mi ĵus deprenis de mia leterkesto mi legis la alineon je la fino de la folio 20.

„Salutoj de Amikoj.“ La ideo kapfrapis min ke eble plaĉos al vi ricevi salutojn de leganto kiu troviĝas en la antipodo . . .

Estas granda plezuro preni ĉi tiun okazon saluti la esperantistaron de GDR, kaj samtempe viajn ge-legantojn en ĉiu el la landoj al kiuj via ĵurnalo estas disvastigita.

Trans la spaco mi elkore kaj samideane sendas bondezirojn, kaj restas la via.

Clifford H. Brown, F. B. E. A.“

Recenzo

Izolo, poemaro de K. Kalocsay, Eldonis Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1977, 77 p. Bindita, kun ŝirmkovrilo

Per ĉi tiu poemaro la esperantistaro ekhavos la eblon alproprigi al si parton de la heredaĵo de Kalocsay, tiu grandegulo en Esperantujo. Temas pri faksimila represo de libro, kiu estis verkita en la tridekaj jaroj kaj presita 1939, sed ne eldonita pro la eksplodo de la mondmilito. Saviĝis nur kelkaj ekzempleroj, kaj laŭ unu el ili UEA nun faris ĉi tiun represon. Tamen ne ĝia tuta enhavo restis tute nekonata ĝis nun. Ne malmultaj poemoj el ĝi troviĝas en la jubilea libro „Ora Duopo" (Budapest 1966). Sed la tekstoj en Ora Duopo kelkloke diferencas iomete de tiuj en „Izolo", ĉar, kiel William Auld diras en sia antaŭparolo, Kalocsay estis poeto, kiu konstante reviziis siajn tekstojn. Estos aparte interese esplori tiujn diferencojn kaj eble fari el ili konkludojn lingvajn kaj poetikajn.

La poemaro, pri kies poezia valoro kaj poetika majstreco garantias la nomo de la poeto, estas subdividita en la partojn: Verdstele (primovadaj poemoj), Malnovaj Madrigaloj, Sur la Monto Nebo, Japaneskoj. Kvankam ne mankas gajaj tonoj, entute superregas pesimisma, malserena agordo. En tio certe respeguliĝas la antaŭtimoj, kiuj obsedis politike klarvidajn homojn en tiuj antaŭmilitaj jaroj, dum kiuj la faŝismo pli kaj pli fortiĝis. Jen evidente la fono de tiu pesimismo, kiu enkonduke igas la poeton kompari sian staton al

„. . . la krevinta sonorilo,
Kiu en la duonruina turo
Silentas, forgesinte pri l' jubilo
De himnoj en dezerto, kien spuro
De hom' ne gvidas plu; . . .",

kaj kiu fine, adiaŭante, instigas lin pentri jenan bildon pri la estonteco de la homaro, bildon des pli ŝokan, ke tiaj sinistraj vizioj eĉ nun, post kvardek jaroj, ne malaktualiĝis pro la neŭtron-armila minaco al la mondo:

„Forsonos kant', kaj mortos trilkoncertoj!
„Dezertas koroj, kaj, post sangelĉerpo,
La landoj same iĝos jam dezertoj,
Kie apenaŭ kreskos eĉ la herbo.
Kaj flugos ne alaŭdoj sed vespertoj
Ĉe l' tomb', kie sin murdis la homcerbo."

D-ro K. Schulze

★

Tibor Sekelj en GDR

La mondkonata esploristo, mondvojaĝanto kaj muzeologo, la esperantisto magistro Tibor Sekelj, restadis de 1. — 6. 10. 1978 en GDR. Li vizitis la urbojn Berlin, Leipzig kaj Dresden, kie li prelegis kun lumbildoj pri siaj neelĉerpeblaj travivaĵoj. De Sekelj, kiu verkis pli ol 12 librojn kun ĉ. 50 eldonoj en multaj lingvoj, ankaŭ i. a. aperis en Esperanto „Tempesto super Akonkago", „Nepalo malfermas la pordon" kaj „Tra la lando de la indianoj".

KORESPONDDEZIROJ 31635

Hungario

Instituta profesoro pri la rusa lingvo kaj literaturo partoprenos 1979 la kongreson de instruistoj de la rusa lingvo en Berlin, 35 jara, dez. kor. kun fraŭlino el Berlin. D-ro Attila Salga, **3301 Eger,** pf. 43

Pollando

Studenta Esperanto Rondo RUSZSP, **Wroclaw,** ul. Sklodowskiej Curie 65, dez. kor. tutmonde pri sciencaj problemoj, turismo

Urszula Ryksa, Bogdanow 58, **99-372,** (20j.) dez. kor. pri muziko, sporto, literaturo

Lernantino, 18j., dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, sporto, turismo, kino, teatro, kol. pm, bk, revuojn: Krystyna Kuczynska, **58-160 Swiebodzice,** Os. Przod. Pracy 20/12

Anna Rocka, Polanowice 5, **88-150 Kruszwica,** 18j., dez. kor. pri arto, muziko

Krystyna Szukalska, **57-350 Kudowa Zdroj,** Stone 7, 17j., dez. kor. kol. bk, diskojn

Elzbieta Knach, **58-160 Swiebodzice,** ul Rutkowskiego 9 m 1, 18j., dez. kor. pri literaturo, moderna muziko, kino, teatro, kol. pm, bk

Marek Truszkowski, **09-500 Gostynin,** ul. Gabinska 39, 16j., dez. kor. pri historio, literaturo, moderna muziko

Junuloj, 15—21j., de la Junulara Kulturdomo, **80-826 Gdansk,** str. Ogavna 56, dez. kor.

Rumanio

25jara filologia studento deziras korespondi kaj interŝanĝi sondiskojn aŭ poŝtmarkojn kontraŭ Esperantaj libroj kaj revuoj. Hans Vastag, **R-1953-Jimbolica,** Calea Timisoarii 1

Soveta Unio

Lernanto, 12j., dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk: Muĥumov Murat, **483 310 Talgar/Kazaĥio,** Beregovaja 80

Junulino, 17j., dez. kor. pri moderna muziko, kol. pm, bk: Laima Bieliauskaite, **234 365 Stakliŝkes,** Prienu Raj., Litovio

Instruistino, dez. kor. pri literaturo, muziko, sporto, E-movado, kol. insignojn: Alla Silantjeva, do vostrebovania, **450 025 Ufa-25**

Sylvija Kruza, **226 057 Riga,** str. Aglonas 10-2-58, Latvio, 18j.. dez. kor.

21j. studentino dez. kor. pri interlingvistiko, lingvoinstruado, kol. esperantajojn: Svetlana Pogorelaga, **Kiev-35,** Urickovo d. 19, kv. 73

Esperanto-Klubo Ufa, **450 025 Ufa,** abonkesto 162, dez. kor. k. geamikoj el Halle

Studentino, 19j., dez. kor. pri muziko, kol. pm, bk: Leili Lôvi, **200 035 Tallinn,** Oismâe tee 146-30, Estonio

Studentino, 19j., dez. kor. pri muziko, turismo, kol. bk, kalendaretojn: Riina Palk, **200 016 Tallinn,** Harku 37-6, Estonio

E-instruisto dez. kontaktojn k. junularo en GDR: Johannes Palu, **200 016 Tallinn,** poŝte restante

Lernanto, 12j., dez. kor. tutmonde k. samaĝuloj, kol. pm, bk: Andreo Ignatov, **483 310 Talgar/Kazaĥio,** Gagarina 102a, kv. 27

Inĝeniero, 22j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Laimundas Abromas, **Jurbarkas** 234 432, p. Pilis-1, Litovio

Studentino, 17j., dez. kor. tutmonde, kol. bk: Olja Panova, **665 806 Angarsc-6,** pk. 684

Lernanto, 17j., dez. kor. pri muziko, foto: Giedrius Šimulionis, **232 004 Vilnius,** J. Kupalos 19-7, Litovio

Komencanto dez kor. p. ĉ. t., kol. pm, bk, kalendarojn: Askat Ahmetŝin, ul. Sporta 4a-23, **487 090 Kentau,** reg. Čimkent, Kazaĥio

Geesperantistoj el Samarkand dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.:

Jura Petroŝevič, ul. Gagarina, pr. 2, d. 1/2, **703 003 Samarkand,** 27j.

Anatolo Ionesov, ul. Sovetskaja 53,

Herausgeber: Kulturbund der DDR
(Zentraler Arbeitskreis Esperanto)
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. – Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. – Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 977